
Turanĝia Luko
numero 14



2-a trimestro 2009

En tiu numero vi legos..

Nia grupo nakiĝis en 1905. D. Baron rakontis ĝian historion kvankam li ne povis konsulti la arkivojn de la 35 unuaj jaroj.	p.1 p.2
La ĝardeno de Francio ne ĉiam estis kvieta. Kiel en Gevaudan, terura besto mortigis homojn. D. Baron rakontas.	p.2 p.3
J-J Moreau daŭrigas sian vojaĝon al la Nigra Maro.	p.3 p.4
La ĉi-vintra neĝo revenigis infanecajn rememorojn al M-C. Ledoux.	p.4
Sen aŭ kun ĉapelo, daŭrigo de la listo.	p.5
Kial bovino parolas la ŝafan ? J. Turbillon tradukis poemon de juna verkisto.	p. 6
Marie Ziková sendis alian fabelon.	p.6
Ridu kun J. Maussion.	p. 6
J-M Simonet proponas artikolon de sia dana leteramikino.	p. 7
Kiu sukcesos deĉifri la du zamenhofajn proverbojn proponitajn de J. Turbillon ?	p.7
Gustumu « Botteraux-n » laŭ la recepto de J. Layseman.	p. 8
Kiel paneo de lokomotivo ŝanĝis la vivon de A. Aude.	p. 8

Komputilaj serĉoj… kaj tro rapida kontrolo.
En la 13a Turanĝia Luko, kelkaj linioj malaperis :
– paĝo 4, la fino de la dua kolumno. Tiel ni reiros al la komenco de la paragrafo antaŭ ol daŭrigi la pertandeman vojaĝon.
– paĝo 8, fine de la dua kolumno : "pro tio ŝi ne estu forgesita.
André Aude"

En kiuj cirkonstancoj la arkivoj de la esperantista grupo de Tours brulis dum la dua mondmilito ?

En la posttagmezo de la 18a de Junio 1940, la unuaj germanaj soldatoj alvenis en St Symphorien. Vespere, ĉirkaŭ la 23a horo, la francaj soldatoj komisiitaj por defendi la riveregon Loire eksplodigis arkaĵon de la Ŝtona Ponto kaj samtempe la kanalaron, kiu, venante de la rezervujo de St Symphorien, provizis la urbon Tours per akvo.

La morgaŭan tagon, sur la montetoj de St-Cyr kaj St-Symphorien, kanonaro estis aldirektita al la urbo. En la boskoj de la insulo Aucard, mitraloj kaj unu kontraŭĉara kanoneto pafis la maldekstran riverbordon kaj la du konstruaĵojn, kiuj enkadrigas la nordan parton de la strato Nationale : la urba biblioteko kaj la lernejo de la Belartoj. Kugloj trairis la fenestrojn kaj provokis ekincendion.

Ĉirkaŭ la 4a kaj duono, la germanoj komencis pafi per kanonoj. La du cititaj konstruaĵoj estis la unuaj atingitaj kaj la pafado daŭris ĝis la 9a horo. La biblioteko komencis bruli kaj la fajro estis bone provizita per la libroj.

La pafado atingis la centron de la urbo. La tegmento de la preĝejo St Julien estis detruita. Rompoj de gasa kanalaro estigis incendiojn, kiuj rapide etendiĝis. Pro manko de akvo, la fajrobrigadistoj estis senpovaj por lukti kontraŭ la fajro. Sed dank'al la putoj kaj kelkaj rezervujoj, ili sukcesis limigi la sinistron en kelkaj lokoj. Tamen, la incendio furiozis.

Ĵaudon, la 20an de Junio, la domoj de la strato de Halles detruiĝis pro flamoj. La presejo Mame transformiĝis en grandegan ardejon.

La 21an de Junio, la unuaj germanaj soldatoj penetris en Tours kaj la svastika (hokokruca) stan-

dardo ŝvebis sur la fasado de la hotelo de l'Univers. Dume, forta fulmontondro estingis kelkajn fajrejojn.

La rezulto de tiuj 3 tagoj de incendio estas impresa : 10 hektaroj de la urbo estis ruinigitaj ; 550 loĝejoj detruitaj ; 9000 personoj senhejmaj. La strato Nationale, la hotelo de Beaune kaj precipe la urba biblioteko kun 2088 manuskriptoj, 212000 volumoj kaj **la arkivoj de la esperantista grupo de Tours** iĝis fumo.
Restis nur ruinaĵoj, restaĵoj de nigrigitaj muroj, ĥaosa amaso da cindrigitaj ŝtonoj.

Jes, oni rekonstruis ĉion, sed oni ne povis anstataŭigi la detruitajn dokumentojn.

Dominique Baron

Dekstre, la urbodomo, iĝinta biblioteko en 1904 kaj maldekstre, la lernejo.



La besto de Benais

Ĉiu el ni konas la faman « beston de Gévaudan » [ĵevodan]. Tiu besto fariĝis mita.

Unu jarcenton antaŭe, la okcidenta parto de Turanĝio konis sian 'beston' multe pli mortigan ol tiu de Gévaudan, ĉar ĝi faris duoble pli da viktimoj dum dek ok monatoj.

La unua manifestacio de la besto okazis la 19^{an} de Februaro 1693 : tiun tagon, oni trovis la korpon kruele disŝiritan de 9 jara knabo, Pierre Boireau, loĝanto de St Patrice, proksime de Benais. Tiu okazaĵo ŝajne estis banala, ĉar tiu arbara kaj erikeja loko estis rifuĝejo de multaj lupoj.

Sed, kelkajn tagojn poste, la 24^{an} de Februaro, iom pli norde, apud Continvoir, oni retrovis la korpon kruelege stumpigitan de knabino 7 jara, Antoinette Doriant. Unue, pri tiuj du dramoj, oni vidis nur hazardon. Sed baldaŭ, oni signalis aliajn viktimojn en la paroĥoj ĉirkaŭ la arbaro de Benais : Essards, Restigné, Bourgueil…Oni ne plu parolis pri koincido : nedubeble, tiuj dramoj estis ligitaj.

Ĉiam en tia okazo, la personoj kredis vidi la beston ĉie. Atestantoj priskribis ĝin per multaj detaloj. Ili prezentis ĝin pli kaj pli dika, pli kaj pli monstra. En la menso de la plejmulto, temis pri diabla besto. Tio, kio surprizis ĉiujn, estis la fakto, ke la sovaĝbesto atakis nur la homojn, neniam la brutaron. La afero komencis esti konata ekster la okcidenta parto de Turanĝio.

La intendanto de la Reĝo en Tours, sinjoro de Miromesnil malkvietiĝis. Tamen li pensis, ke tiuj ripetitaj agresoj estis la fakto de pluraj lupoj, ne de unu sola besto. La organizitaj batuoj ne donis rezultojn. Certe, oni mortigis lupojn, sed la agresoj daŭris. La paroĥestro de Varennes-sur-Loire skribis, ke eble temas pri linkoj. La semajnoj pasis kaj la listo de viktimoj pli longiĝis. Neniu plu iris arbaren. Sed malgraŭ la singardoj, la mortigaj agresoj pluis. Fine de Novembro 1693, oni ĉeestis eĉ al vera hekatombo. La besto frapis la 18^{an} en Langeais, la 19^{an} en Bourgueil, la 22^{an} en Continvoir, la 23^{an} en Bourgueil, la 25^{an} en Restigné, la 26^{an} en Benais, la 27^{an} en Bourgueil…En Maziéres, de la 29^{a} de Novembro ĝis la 3^{a} de Decembro, oni nombris 4 viktimojn. En Langeais, dum 3 sinsekvaj tagoj la besto mortigis 3 personojn. Du semajnojn poste, meze de Decembro, ankoraŭ en Langeais, oni kalkulis 3 mortigitojn dum 3 sinsekvaj tagoj. La jaro 1693^{a} finiĝis en terura etoso. La nova jaro komenciĝis same.

Malesperigita, la loĝantaro ne plu sciis kion fari por haltigi la plagon. La klerikaro multo-

bligis la preĝojn. La ĉielo ŝajne aŭskultis ilin, ĉar, komence de Aŭgusto, sen scii kial, la buĉado ĉesis.

La historiistoj opinias, ke la besto faris almenaŭ 200 viktimojn dum 1 jaro kaj duono, do meznombre 10 mortintojn monate. (la besto de Gévaudan mortigis centon da personoj dum 3 jaroj, do meznombre 3 monate). Kial do, la besto de Benais ne konis la saman gloron kiel tiu de Gévaudan ? Eble, tiam la novaĵoj malfacile cirkulis en la reĝlando kaj tiu afero ne iris ekster la regionan skalon.

Dominique Baron

Pri nia vojaĝo tandema al la nigra maro

La tridekan de Majo ni atingas VIENO(N) (la nomo originas el Vieno, afluanto kiu kuniĝas la Danubon en tiu loko). Ni vizitas la belegan palacon imperian de Sissi.. Ĝi estas la plej bela palaco kaj la plej belega urbo kiun mi vidis en mia vivo. Ni restas du tagojn kiuj ne sufiĉos. Ni profitas ke, dum dudek kvar horoj, sen interrompo, oni muzikas en ĉiuj kirkoj. La fasadoj estas perfekte prizorgitaj, oni konstatas ĉie rafinitaĵojn en la stratoj. Ni malkovras la domon de Mozart, eble ĉu li muzikas « etan noktan muzikon » ? En tiu urbo oni ne povas ne artitistiĝi aŭ amegi la arton. Vieno estis dum jarcentoj la danuba urbo la plej granda kaj ĉefa, sed, nun, ĝi devas partigi la statuton kun Beogrado kaj Budapeŝto. Sur la aŭstria teritorio staras dek unu hidroelektraj baraĝoj. Ni forlasas Vieno(n) kiel eble plej frue por admiri, lastfoje, la urbon, pli facile ol dum la tago. Sabate, neniu aŭtomobilisto kaj neniu, oni povas tute trankvile admiri la detalerojn el la monumentoj.

Ni transiras la Danubon sur ponto por eniri SLOVAKIO(N). La Danubo landlimiĝas inter Slovakio kaj Aŭstrio, poste, post kvardek kvin kilometroj, ĝi trapasas BRATISLAVA(N), la slovakan ĉefurbon kiun ni vizitas « rapide farite ».

Hodiaŭ, sabatas. Tago de la geedzidĝo, ni profitas la okazon eniri en la kirkojn, diskrete. La tieaj partoprenantoj kantas, oni kredus esti en la Novorleano. Ekstere, nova paro estas fotata per fotisto, tuj, ili rimarkas nian rajdobeston, la junaj gekolombumantoj volas lokmeti ĉe kaj sur la tandemon, verŝajne neniu en tiu lando faris tiel. Malproksime, staras alia novparo kiu petis nin. La tandemo, ĉie kie ni iras estas la konduktila fadeno… sufiĉas peti nin, kaj la kurento pasas. Juna lernanto vidante la tandemojn, vokas min, saĵne, li volas babili kun ni. Li lernas la francan en liceo, li rimarkis nian trikoloran flagon ankriĝitan ĉe la pakportilo. Li studas en liceo tute proksime, ni babilas mallongtempe ĉar niaj aliaj kamaradoj atendas nin ĉe la alia riverbordo.

Nun ni alvenas en HUNGARIO, ni forlasas la komfortan vivon kaj ekmalkovras difektitan vojaron, la vojplano mankas, ofte ni devas ĉirkaŭvojiri ĉar ni devojiĝas, sed la sindonemaj homoj envojigas konsilante ŝparvojojn al ni. Kiam ni laŭiras la stratojn oni trovas domojn kiuj pensigas nin esti de nove en Rusio, kelkfoje en la mezepoko, poste… en la dudek unua jarcento.

Hodiaŭ ni ruliĝas sur digo kie ni renkontas gejunulojn rulŝuantajn. La junulinoj surmitis tre etajn bankostumojn, ĉiuj aŭskultas mp3. Oni sentas ke tie la kutimoj kaj la moroj liberiĝas rapidege, ni renkontas eĉ nudismantojn, ili ne kaŝas sin. Pli malproksime, ni vidas kamparanojn, ili ŝajnas vestitaj kiel servutuloj, ili rastas kaj kolektas la fojnon per ligna rastilo, kurioza kontrasto.

Jen loko kie ni povos dormi, ni ne trovis alian « tendumejon ». Tie la partoprenantoj en geedzidĝo festas…kaj ebriiĝas tute proksime al la tendoj, ili ne estas agresemaj, ne gravas, estas la aventuro, ĉu ne ? La kuloj svarmas… oni ne gapas lontempe ekster la tendoj kiuj ne havas kulvualojn. Por lavi sin, estas banejo, ĉio estas nova… kaj ĵus difektita, la pordoj ne havas seruron kaj ne povas fermiĝi, la kranoj likas, mi ne parolas pri la necesejo, tie la homoj ne estas zorgemaj. Ni ne scias ĉu ni dormis… oni travivas novan danuban etoson.

La unuan de Junio, ni transiras la eksan feran kurtenon. La militistoj forlasis ĉion surlo-

ke, dezertecas, la vojaro konsistas el radsulkoj, la domoj estis pli malprizorgitaj ol en Rusio, ĉio estas malriĉeco. Ĉio samaspektas, ĉu oni ne diras « la enuo iam naskiĝis el la samaspekto » ? Estas malfacile imagi sin ke iom da tempo antaŭe ni estis en alia mondo. Kurioza kontrasto !

Oni ekbezonas scii pli pri la historio de tiuj landoj, alimaniere ol per la amasinformiloj.

Por aliri la junulargastejon, biciklista paro gvidas nin tra la ĉefa urbo BUDAPEŜTO. Neniam ni ruliĝis tiel rapide, ŝajne la paro estas gesportuloj. Oni kredus ke ni estas poskurataj de kruelaj hundoj. Ni ne devas okule perdi la malantaŭan radon de niaj geĉiĉeronoj kiuj konas nek nian aĝon nek la fakton ke ni estas ĵus trakurintaj cent kvindek kilometrojn, ĉarĝitajn kiel azenoj. Ili montras al ni la monumentaron sed ni ne povas vidi ĝin, ni estas tro okupataj rigardi la truojn sur la ŝoseo. Ni restos du tagojn en Budapeŝto.

La unuan tagon , ni vizitas la urbon kun esperantisto, li estas la redaktorestro de la revuo « Juna Amiko » (kvankam li ne estas juna), mi povas babili kun li flue (dank'al miaj sindonemaj geinstruistoj). Li montras al ni, multajn monumentojn kaj tre interesajn lokojn, li privilegigas nin, kompare al la aliaj. Kelkaj domoj estas tiel belaj kiel la aliaj, sed, ofte malbone zorgitaj, kelkfoje forlasitaj en sia stato. Ni admiras la ĉefurbon de la altaĵoj, ni supreniras la ŝtuparon kaj alvenas al la balkono de la kupolo de la katedralo, tiel ni povas admiri okule ĉirkaŭe. La nomo de Budapeŝto devenas de la kuniĝo de la du urboj t. n. Buda kaj Peŝto en mil okcent sepdek. Maldekstra riverbordo estas la riĉa kvartalo Nia ĉiĉerono ne tro parolas pri la amasbuĉado kiu okazis tie, la doloro estas tro proksima.

La morgaŭan tagon, ni rendevuas en la nacian bibliotekon kun du esperantistinoj. La plej juna estas terurigata ĉar ŝi imagas sin eklernantino, mi estal kiel ŝi, eble pli. Mi komprenas ŝian timemon. Nia gastigantino ŝvitas, parolas tremante kaj mallaŭte (plie maljuniĝante mi surdiĝas) tial ofte mi jesas aŭ ŝajnigas kompreni. La estrina bibliotekistino gastigas nin kaj plezure parolas la francan perfekte. Unu tuta ĉambro entenas revuojn, diskojn, kasedojn, filmojn, CD, DVD, k. t.p. pri Esperanto. La jarlibroj de la unuaj numeroj ĝis nun, staras ĉi-tie, jen dikegaj, jen maldikaj, ĉefe dum la milito. La estrino rajtigas nin subsigni la oran libron. Ni trinkas kune teon kaj gustumas kukojn… Estas ankoraŭ nova danuba etoso.

Bedaŭrinde ni forlasas Budapeŝto(n), ni eltrovas de nove ŝoseojn kie mankas gudro, indikpaneloj ankaŭ, ni petas la vojiron al leterportistino kiu ne komprenas. Oni nomas min la hodiaŭan deĵoranton, mi devu trovi la bonan vojon. La vojeto estas kotega. La kotŝirmiloj ne plu faras sian laboron, la radoj enigas la kotajn radsulkojn, oni ne vidas la radrondojn, la spokoj malpuriĝas, la framo ankaŭ, ĉar ĵus pluvis. Virino mansignas al ni ke ŝi volas ĉiĉeroni nin sur la bonan vojon… sur pavimojn, ĉio kaj ĉiuj tremas, la manoj kaj la pugoj doloras. Kompare kun Paris-Roubaix, estas pli malbone. Jen sakstrato… sed ĉe la piedoj de la Danubo, nia ĉiĉerono komprenigas nin, dirante kaj montrafingre, ke baldaŭ venos pramo, ni dankegas ŝin tutkore.

Jean-Jacques Moreau

La neĝeroj

La neĝeroj falas malrapide, sen brue sur la tero.
Mi rigardas ilin kaj mi pensas iliajn aventurojn.
De kie ili venas ?
Kion ili vidis antaŭ surteriĝi ?
Ĉu ili havas rendevuon,tie ?
Aŭ ĉu estas la hazardo ?
Kiam mi prenas ilin en la manon, kial ili foriras sen doni al mi respondon ?
Aliaj neĝeroj sidas sur branĉoj, sur aŭtoj, sur herboj …., por ke la infanoj ludu kun ili, antaŭ foriri kiam la suno forte brilos.
Kiam neĝo falas, multaj infanecaj memoraĵoj revenas. Gefratoj kaj mi, de la patro atendis la revenon. Ni bonvenigis lin per neĝbuloj, kaj la patrino ridis ĉe la fenestro.

M-C. LEDOUX

Sen aŭ kun ĉapelo ? *

esperanto	français	**esperanto**	français
Josi - Josef	(diminutif caressant)	ĵosi	mettre en jauge
judo	juif	ĵudo	judo
jugo	joug	juĝo	jugement
julo	godille (marine)	ĵulo	joule (physique)
juro	le droit	ĵuro	serment
kaco	pénis humain	kaĉo	bouillie
kaprico	caprice	kapriĉo	caprice (musique)
kaso	caisse	kaŝo	dissimulation
komposti	composer (typographie)	kompoŝti	fumer (avec compost)
koncerto	concert (musique)	konĉerto	concerto (musique)
kruco	croix	kruĉo	cruche
laca	fatigué	laĉa	avec un lacet
lanco	lance, pique	lanĉo	lancement
large	largue (marine)	larĝe	largement
lasta	dernier	laŝta	concernant le last(mes.)
lego	lecture	leĝo	loi
logi	attirer	loĝi	habiter
logistiko	logique mathématique	loĝistiko	logistique
maco	azyme (religion)	maĉo / = matĉo	mastication / match
manego	grosse patte	manեĝo	manège (équitation)
mango	mangue	manĝo	repas
Marso	Mars (myth.) (astr.)	marŝo	marche
maso	masse	maŝo	maille
mergo	immersion / harle	merĝo	mergule ou guillemot
mocio	motion	moĉio	mets japonais
mosto	moût	moŝto	titre de politesse
muso	souris	muŝo	mouche
negi	nier	neĝi	neiger
Nico	Nice	niĉo	niche (architecture)
noco	nuisance	noĉo	entaille/dent (de roue)

*Eltiraĵo de la libreto de Jacques Gaumé "Sen aŭ kun ĉapelo", franca traduko de la libreto de Josef Murĵan "Por kio ĉapelo ?"


Multaj autoroj verkis pri interkompreno... eĉ la plej junaj.

Juanita Turbillon tradukis tiun poemon verkitan de unu el siaj junaj lernantoj en la jaro 197.*

La ŝafa bovino

Bovino estis en arbaro.
Ĉasisto ŝin vidis kaj pafis al ŝi.
Li senhaŭtigis ŝin kaj purigis ĝin.
Li forĵetis la nudan bovinon.
Iu trovis ŝin
Kaj metis al ŝi ŝafan felon.
Ŝafo vidis ŝin, alparolis ŝin : « be..e..e.. »
Sed la bovino ne povis respondi.
Ŝi parolis la bovan.
Ŝi diris : « Mi ne estas ŝafino,
mi estas bovino ».
Sed la ŝafo ne komprenis ŝin.
Ili interbatalis.
Poste la bovino restis apud la ŝafoj,
Ŝi lernis la ŝafan.
Ili amikiĝis.
La ŝafo donacis al ŝi belan floron.

Mohamed, 6 jara



Delphine, 6 jara 1/2

Karaj geamikoj mi sendas al vi pluan pilsenan historieton. Salutas vin ĉiujn Maria. Zikova

La anĝeleto por feliĉo

Nia urbo Pilseno havas multajn belajn legendojn. Jen unu el multaj:

Laŭ la legendo antaŭ multaj jaroj genufleksis pilsena ekzekutisto ĉe preĝeja krado kun bronzaj anĝeletaj kapetoj en la tago de lia edziĝfesto. Li, „ majstro ekzekutisto" ne rajtis eniri en la preĝejon. Lia amiko anstataŭis lin ĉe la altaro kaj li devis atendi ekster la preĝejo, preĝante, genuflekssante ĉe la krado kun anĝeletoj.

Kiam „majstro ekzekutisto" intencis ekstari, li ekbalancis kaj tuŝis senintence la kapeton de tiu bronza anĝel-kapeto. Tion rimarkis apude starantaj bigotaj avinaĉoj, kiuj kredis, ke ĉio, kion la mano de la majstro ekzekutisto tuŝis, alportas feliĉon. Ek de tiu tempo tion faras multaj homoj, kiuj kredas havi ankaŭ la feliĉon, se ili tuŝas, mankaresas la anĝeleton ! Ĝis hodiaŭ oni faras tion, la kapeto estas de tiuj tuŝoj okulfrape glatigita. Tiuj homoj, kiuj ne konis ĉi tiun kutimon, post klarigo faras same! Do, kiam vi vizitos nian belan urbon, faru tion ankaŭ, esperante, ke la feliĉo vin ankaŭ trafos.


● ● ● ● ● ● ●

❖ Kuracato tre kontenta premas la manon de sia kuracisto kaj diras :
« Ĉar ni estas nun bonaj amikoj kaj ĉar vi resanigis min, mi ne volas ofendi vin per pago de viaj konsultadoj sed mi volas, ke vi sciu, ke mi skribis vian nomon sur mian testamenton !
- Ho dankon, diras la kuracisto, vi estas tro afabla ! En tiu kazo, ĉu vi povas redoni al mi vian recepton ….Mi kredas ke mi forgesis *ion... !* »

❖ Du esploristoj estas perditaj en ĝangalo. Subite ili aŭdas tigrajn roradojn, kiuj versajne, estas proksime. Unu el ili eligas el sia sako paron de kuradaj ŝuoj kaj surŝovas ilin tre rapide. La alia observas lin mire kaj demandas :
« Diru, ĉu vi vere esperas kuri pli rapide ol tigro ĉar vi surŝovis bonajn kuradajn ŝuojn ?
- Ha ne ! Mi ne bezonas kuri pli rapide ol tigro …. sed komprenu, mi nur bezonas kuri pli rapide ol *vi* !!! »

J. Maussion

Juanita proponas strangan mesaĝon. Temas pri du zamenhofaj proverboj. Ĉiu signo reprezentas ĉiam la saman literon.



☆ = A

Pensoj pri la interna ideo

de Tara Gregers, la dana leteramikino de Jean-Mary Simonet.

En la jaroj ĵus post la komenco de la 20-a jarcento Zamenhof skribis pri sia interna ideo de Esperanto. Tiu tempo estis tre maltrankvila kun batalado, genocidoj kaj tumultoj kaŭzitaj de diferencoj rasaj, lingvaj, religiaj, naciaj, ktp. Kaj en 1914 la Unua Mondmilito komenciĝis.

Li ne nur kreis la lingvon Esperanton sed ankaŭ la tiel nomatan internan ideon. Samtempe li elektis nian verdan flagon kiel simbolon por ĉi tiu interna ideo. Verda kompreneble, ĉar li - kaj ni - esperas je unu paca mondo sen militoj, konfliktoj, ktp.

La lingvo estis kreita por faciligi komprenon inter homoj el diversaj rasoj, kredoj kaj nacioj. La interna ideo por klarigi lian celon kun Esperanto. Lia intenco estis ke ĉiuj popoloj en la mondo interfratiĝis egalece, solidarece kaj justece.

Zamenhof ankaŭ apogis kongresojn ĉar dum kongresoj homoj el la tuta mondo kunparolas kaj vere vivas la internan ideon. Laŭ li kongresoj estas edukejoj de la interfratigita homaro kaj ĉiujare konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

Liaj deziroj, la entuziasmo kaj idealismo estis utopio dum tiuj jaroj, sed nuntempe la mondo estas alia. Certe estas, ke multaj esperantistoj jam dumvivas lian internan ideon sen koni ĝin ! Dum kongresoj ni vere ne pripensas religiojn aŭ rasojn, ni nur ĝojas pri la fakto ke oni povas komuniki kun homoj sen devi lerni plurajn lingvojn.

Fakte mi miras se Zamenhof ne sciis pri Unitariismo? Kiel unitariano mi vidas tre grandan konsenton inter lia interna ideo kaj Unitariismo.

Unitariismo temas pri la sama kredo por ĉiuj; unu kredo kiu unuigas ĉiun kredon egale la nomon (islamo, kristianismo, paganismo, agnostikismo, ktp.). La nomo ne gravas, ĉar unitarianoj kredas ke ĉiu kredo havas la saman etan parton de la 'vero', la 'dieco'. Ĉiu kredo kutime estas kiel la 'vestaĵoj de la lando/kulturo/tradicio' de unu homo. Unitariismo ne anstataŭas kredojn, sed bonvenigas ĉiun kredon al diservoj kaj diskutkunvenoj. Ĝi postulas toleremon kaj respekton - ĉiam reciproke ! Ni volas unu mondon sen bataloj inter religioj/kredoj, vivante pace kun unu la alia.

Zamenhof deziris krei pacon inter homoj per komuna lingvo. Unitarianoj provas la samon per unu kommuna kredo. Ambaŭ pace batalas por pli bona mondo.

En la belaj vortoj de Zamenhof mem:

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Fontoj:

Ludoviko Lazaro Zamenhof, Festparolado, la 28-an de aŭgusto 1906, Ĝenevo

Ludoviko Lazaro Zamenhof, Parolado, la 12-an de aŭgusto 1907, Kambriĝo

B O T T E R E A U X [botro]

(Fritpastaĵoj de Karnavalo)

- 500 g da faruno
- 3 ovoj
- 1 supkulero da salo
- 1 taseto da akvo duonvarma
- 60 g da butero
- 200 g da pulvorsukero
- 1 saketo da vanilita sukero
- 1 saketo da gistapulvoro
- iomete da brando

Apartigu ovoflavojn kaj ovoblankojn.

Ŝaŭmkirlu la ovoblankojn ĝis firmeco.

Fandu la buteron en la akvo kaj aldonu al la ovoflavoj.

Miksu kun la ovoblankoj, aldonu la farunon, salon, sukeron, brandon kaj gistapulvoron ĝis formo de pastbulo sufiĉe firma.

Prenu parton de tiu pasto, platigu ĝin per rulbastono ; tranĉu ĝin en pecoj de diversformoj.

Varmigu ujon entenanta oleon ; por vidi ĉu la temperaturo estas sufiĉe varma, metu en la oleon pecon da pasto, kiu devas rapide supreniri al la surfaco de oleo ; se la temperaturo estas bona, metu plurajn pecojn samtempe.

Lasu oriĝi ĉiuflanke, eltiru kaj metu ilin sur sorba papero.

Pulvorigu sukeron sur ilin.

Gustumu tiujn « botrojn » kiam ili estas varmaj.

Tiuj kukoj ne havas la saman nomon laŭ la regiono. Oni nomas ilin ankaŭ : « Merveilles » [mervej] aŭ « Bugnes » [bunj], kiuj estas preskaŭ la samaj.

Jeannine kaj Gérard Layseman


****

Ofte hazardo ŝanĝas la vivon...

Dum la jaroj kvindekaj mi ofte iris al Grésillon dimanĉe dum la somero, ĉefe por kontakti alilandajn gesamideanojn. Mi tie konatiĝis kun pluraj francoj, inter ili kun Marguerite Poiron de Cholet, sed, kiel kun la aliaj francoj, salutis ŝin kaj babilis pri bagatelaĵoj, kaj nenion pli.

Iam, dum la jaro 1954a, au 1955a, okazis en Angers renkonto de SAT-Amikaro, kvankam ne SAT-ano, mi iris por aŭdi kaj praktiki Esperanton, ĉar mi sciis ke en la renkontoj de tiu asocio la ĉeestantoj nepre uzas Esperanton. Kun ili krokodilado ne ekzistis. En tiu tempo sur la fervojo de Tours al Nantes, la trajnoj estis remorkitaj de vaporlokomotivoj. Laŭ la horaro mi devis alveni en Angers unu horon antaŭ la renkonto, do sufiĉe frue laŭ la grandeco de la urbo. Sed, survoje la lokomotivo paneis. Longe la mekanikistoj baraktis, frapis, ŝajne la difekto venis de bielo. Finfine post du horoj ni foriris.

Kiam mi alvenis en la kunvenejo, la prelegoj jam komenciĝis. La salono estis plenplena, restis nur unu loko libera, apud Marguerite Poiron. En tiu tempo la asocioj ankoraŭ ne organizis komunan manĝon, do ŝi estis sola de Cholet, mi sola de Tours. Ni decidis tagmanĝi kune. Tiam ni pli bone konatiĝis. Ŝi estis unika infano, ankaŭ mi. Ŝia patro estis lignoŝuisto, la mia ŝuriparisto, do ni planis revidi unu la alian kaj tio okazis… ĝis la geedziĝo, kio eble ne estus okazinta sen paneo d e lokomotivo.



André Aude

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr